



Kajeroj el la Sudo

BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

<http://www.districto.com/esperanto/k41.htm>

<http://www.dragonfire.net/~Esperanto/k41.htm>

SUFICIAS!!




NE ELTENU PLU!
HALTIGU LA
SUBPREMADON!!

ILERT

Kajeroj

el la Sudo



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

Prezidanto: *María del Mar Guirao Gallego*
Avda Juan Carlos I, 22-8º-H,
30800 LORCA (Murcia)
Hispanio.

Vicprezidanto: ankoraŭ neniu oficas

Kasisto: *José María Bernabéu Franco*

Gral. Primo de Rivera, 8
E-03360 Callosa de Segura,
ALICANTE (Hispanio).

Sekretario: *José Pina Tuells,*
c/ Stª Teresa, 22-2º CD,
ES30005 MURCIA

Libroservo: *Nicolás Gil Carballo,*
Apartado 305
ES24080 LEÓN

Redaktoro: *Jesuo de las Heras,*
Apartado 4461
ES30080 MURCIA

Kovrilo: *Ŝoka, sed enda mesaĝo kreita de Ŝoka.*

Monsendo de kotizoj kaj abonoj al la
nova konto n° 1302 0412 86
0022655110 *en libreta de Caja*
Postal. Sen aldona kosto. La abono
kostas 1000 pesetojn aŭ 6 eŭrojn.
Kvintancon oni ricevos.

Pretigas la Kajeron:
Provkorekto: José Pina Tuells,
Administro: Juan Antonio Cabezas
Martínez,
Redakto: Jesús de las Heras Jiménez.

Enhavo

Redaktore	3
Alvoko al ĉiuj HALEanoj	3
Informoj de la Prezidanto	4
Nacioj, nova manifesto por homaro	5
Al geesperantistoj de la tuta mondo!	7
Respondo	8
Respondo de samideanoj e Bjalistik	9
Ziryäb, fama muzikisto kaj erudiciulo de Al-Andalus	10
Ĝis revido, Stan!	13
Bus-karavano al la UK de Berlino	14
Virgaj plumoj	15
Infana afero	15
Kio farendas	15
Labormondo: ĉu profito aŭ altruismo?	16
NI savu nian kulturen trezoron	18
Lasta kunveno de HALE	19
LEA ligilo20	
Enkonduko en muzikon: NOTOJ	23

Oni povas reprodskti artikolojn, kondiĉe ke oni citu la originon.

Ni ne korespondos pri nepetitiaj artikoloj. Tamen, ni klopodos publikigi ĉiun artikolon kies enhavo estas interesa kaj ne mis-traktas iun ajn personon.

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem, ne la redakcio.

Redaktore:

Klarigo, ne senkulpigo

Antaŭ kelkaj monatoj mi preskaŭ promesis, ke **Kajeroj el la Sudo** estus dumonata revuo. Tamen, anstataŭ novembre, tiu numero atingas vin februare —eĉ marte en kelkaj kazoj—. Enda estas klarigo, do. Mi devas sciigi vin ĉiujn, ke mi trairis malsanon kaj operacio, kaj ne plu povis okupiĝi pri esperantaj aferoj regulare. Ankaŭ mia komputilo frakasiĝis, kaj mi devis rekonstrui la sistemon de arĥivoj. Laste, sed ne malplej grave, ankaŭ mi ne havis sufiĉan materialon por plenigi la paĝoj de nia magazino.

Mi esperas, ke tio estas nerevenanta aro de malfeliĉaj aferoj, kaj ke ni povos sufiĉe akurate havi nian **Kajero el la Sudo** ĉiu monatotrio.

En ĉi tiu numero vi trovos anoncon pri nia unua kongreso de HALE, planite de la nova estraro de HALE, kies dato ankaŭ vi trovas je la paĝo 19-a. Inter niaj artikoloj ĉi monate, mi substrekas la gravajn artikolojn pri la grava situacio suferata de lernejo **Ludoviko Zamenhof** en Bjalistok, Polio (paĝo 7-a), aj tiu artikolo pri Ziryāb (paĝo 10-a), la plej grava muzikisto en mezepoka Eŭropo. Bedaŭride

Giordano Moya adiaŭas nin kiel verkisto momento, pro sia sano, per sia artikolo *Ĉu profito aŭ altruismo?* (paĝo 15-a). Tie, mi substrekas, ke ni inkluzvas la lastan numeron de **LEA Ligilo** (paĝo 20-a).

Mi esperas, ke vi ŝatu tiun-ĉi delonge atendatan numeron de **Kajeroj el la Sudo**, tiom, ke vi reagu la iuj temoj kaj ni povos inkluzivi vian artikolon la venontan fojon..

Alvoko al ĉiuj haleanoj

La venontan tagon 18-an de aprilo ni havos en Lorĥo nia Unua Kongreso de HALE.

Programo

16:00.- Malfermo.

16:30.- Prelego.

17:30.- Asembleo.

*18:30.- Ronda Tabulo pri
strategioj de HALE.*

*19:30.- Ronda Tabulo pri la
Kajeroj el la Sudo.*

*20:30.- Fermo de la Kongreso.
Informoj.-*

*1 La kotizo estas 100 pesetoj
(cent pesetoj).*

2 Aligilon sendu al:

*Juan Antonio Cabezas Martínez
Calle Jabonerías, 6-3D,*

31001 ALICANTE

Informoj de la prezidanto

Estimataj samideanoj:

Dum la pasinta monato de decembro de 1998 la haleanoj elektis novan estraron. La pasinta prezidanto, María del Mar, estis la unua virino kiu prezidis asocion de Esperanto.

Ni havas novan programon: unue havi komuniko kun la sindikatoj, kaj due plialtigi reale la rilaton kun civila agado.

Ni devas havi rilaton kun la sindikatoj, ni sendos ilin informadon pri Esperanto kun la artikoloj kiuj aperas en la naciaj ĵurnaloj.

Aliflanke, ni kompilos datbazon de asocioj pri

civila agado, kun kiuj ni devas kunlabori pro tio, ke ni havas komunan celojn. Ekzemple, ni havas similajn celpunktojn al tiuj de vegetaraj asocioj.



Hale devas disvastigi Esperanton ekster la movado en asociojn, sindikatojn kaj similajn. Tio signifas ŝanĝi la pensmanieron: novaj lernantoj ne venos al la asocio esperanta, endas, ke Esperanto iras al la asocioj aliaj.

Fine, mi kreads, ke ni devas formi novan tipon de instruisto, kun alt-kvalita uzo de la lingvo kaj kiu serĉas liajn lernantojn.

Juan Antonio Cabezas

Nacioj: nova manifesto por homaro

Ŝokis nin vortoj legitaj en *Laŭte!* pri *kastilianoj loĝantaj en Katalunio* (n-ro 136, paĝo 32), kaj tio diskutigis nin pri tiu nocio, nacio. Kio estas nacio? Ni konkludis, ke tio estis bona afero elpensita de reĝoj por nuligi la povon fian de mezepokaj feŭdistoj, kiuj mortigis siajn sklavojn (*servoj de la gleba*) pro stultaj diferencoj mastraj. Post kreo de Hispanio, Anglio, Francio kaj tiel plu, oni konceptis *komunajn taskojn* (laŭ eldiro de Ortega y Gasset) kaj sangfluado haltis, almenaŭ en granda kvanto. Kelkaj nacioj, kiel Germanio kaj Italio, devis atendi ĝis la XIX-a jarcento por konstrui sin. Lokaj memamegoj malfaciligis ĝin ĝis vastiĝpensantaj homoj finfine sukcesigis sian projekton.

Oni atakas grandajn naciojn, akuzante ilin pri manko da senseco pri individuaj kaj lokaj idiosincrazioj kaj rajtoj gajnitaj antaŭ multaj jaroj. Malgrandaj nacioj, tamen, ankaŭ neas tiujn rajtojn al alilokaj nacioj kaj komunumoj —eĉ al siaj propraj malplimulto—, kiel ni povis vidi ĉe Bosnio Hercegovino kaj Kosovo. Ĉiu diferenco taŭgas por rajtigi mortigon, perforton kaj subpremon!

Oni ne devas esti tro inteligenta por kompreni, ke tiaj krimoj tute ne okazis kiam Jugoslavio ankoraŭ ekzistis. Afrikaj subnacioj ankaŭ mortigas inter si, malsame al kiam ili

formis pli grandan nacion subpremata de eŭropa regio.

Kelkaj etnacioj diferencigas siajn najbarojn pro malsama religio, kvazaŭ oni povus rilati al dio provante, ke ili ne scias kiel rilati al sia najbaro. Aliaj etnacioj, kiel vaskoj —*eŭskoj*, ili perfortignomas sin— defendas, ke grava diferenco estas sia pozitiva rh, kvazaŭ oni stultus sufiĉe por ne kompreni, ke tio estas tute hazarda genetika karakteristiko trovebla ĉie en la mondo. Finfine, plejmulto de etnacioj proklamas, ke lingvoj difinas apartajn naciojn. Estante nur 189 nacioj en la mondo pruvante, ke paco estas malfacila se ebla, ni ne sukcesas kompreni kiel se estus 3 000 sendependaj nacioj (tiom da lingvoj nun ekzistas), paco povus esti alio ol utopio el pasinto tre malofte atingita kaj neniam plu atingebla.

Tiuj etnaciistoj tute ne komprenas kiel kaj el kio lingvoj devenas. Ni ne celas klarigi tion al ili, estante iliaj celoj tute fremdaj al kompreno. Ili nur celas povon, senrigarde de kiom malgrandan povon ili iam atingos. Sed nia celo estu klarigi al tiuj trompotoj de etnaciistoj, por ke almenaŭ ili komprenu pri la lingva mensogo, kiam tiuj etuloj svingis dum tiom da tempo.

Se ekzistas tiom da malsimilaj lingvoj en la mondo, nur kulpas pro tio la ekzistanta disigo de homaro. Montaroj, riveroj kaj oceanoj apartigis homojn dum centmiloj da jaroj, kaj homoj —se ni ĉiuj

iam parolis same, kio estas estas tute dubinda— ŝanĝis niajn parolmanierojn pro nescio, forgeso kaj turpeco. Lingvo natura tute ne havas gramatikon aŭ internan meĥanisman, ĉar kaŭzo kaj bazo de lingvo estas nur interkonsento kaj konvencio. Kiam grandaj imperioj formiĝis, oni trudis siajn lingvojn (greka, latina, hispana, angla, ĉina...) al plimulto de homaro. Post tiuj trudoj senjustaj kaj egoismaj, denove nescio, forgeso kaj turpeco disigis la *normigitan* lingvon kaj lokaj dialektoj iĝis imperiidaj lingvoj, kiel la franca, hispana, itala, aŭ tiom da *dialektoj* ĥinaj kaj *anglaj* de Azio, tute nekompreneblaj inter si (fakte apartaj lingvoj per si mem kvankam ili ne havas armeon aŭ monon). Sed ni ne forgesu, ke lingvo ne estas diferencigilo, sed interkomprenilo. Ksenofobio kaj rasismo ekskludas la alilandanojn, ĉefe pro timo kaj pro ignoro, kaj tiuj du motoroj kreas etnismojn kaj naciojn. Ŝajnas, ke post ekstermi preskaŭ ĉiajn aliajn bestojn, homoj nur toleras sian lokan kulturon kaj provas ekstermi siajn najbarajn. Tion klopodis fari katolikoj kaj muslimoj en Bosnio antaŭ nelonge, forgesante, ke Kristo kaj Allah predikis amon al najbaro, kaj ke *sanktan militon* oni kondamnis en ties ambaŭ sakraj libroj. Sed tiun saman aferon faris hitleranaj germanoj antaŭ 60 jaroj, kiam ili decidis, ke ĉar *sudetoj* (tio estas, sudanoj) estis *subpremataj* de ĉeĥoj, ili aneksiis la tutan landon Ĉeĥoslovakion, politike komencante tiam la Duan Mondmiliton, eĉ se franca kaj brita stulteco tute ne vidis tion.

Aliflanke, ni vidas tian Grandan Fratton (Eŭropusono) invadante malriĉajn naciojn nur kiam siaj interesoj endanĝeriĝas, kaj ni ne tute kondamnas la aferon. Invado povas esti oportuna aŭ ne, homrajtkomprenebla aŭ ne, ne tiom multe laŭ la celo, kiom laŭ la rezulto. Ne

estante nacio iom respektbla laŭ nia vidpunkto, la sola komprenigo de invado kuŝas ĉe plibonigo de individua aŭ socia bonfarto. Tute ne rajtas Granda Frato ne invadi malriĉon, se invadante ĝin homoj el Etiopio, Somalio kaj multalioj ekmanĝas kaj ekresaniĝas. Eŭropo lasis Afrikon ĉar stultuloj aŭ mensoguloj ribelis laŭ krioj de *libereco* kaj *sendependo*. Multaj jardekoj poste, homoj tie ankoraŭ ne liberiĝis kaj sendependiĝis el malsato kaj malsano. Filozofio kaj politiko anstataŭis justecon kaj homajn rajtojn.

Kion fari en la nuna situacio? Ni vidas, ke landoj kiuj posedas atombomban teĥnologion malsukcesas nutri kaj kuraci siajn popolojn. Sekvo de tio povas esti, ke elmigrantoj fuĝos horde el siaj landoj kaj invados Eŭropon kaj Usonon, kreante kvazaŭmilitan situacion, kie oni devos murdi aŭ esti murdita sociskale. Por malestigi tion, oni povas krei —urĝe— industrion kaj modernan terkultivadon en Afriko kaj aliaj *trimondaj* landoj. Sed tio kolizios kun la jam eleŭropita kaj forte radikiĝinta nocio de nacio kaj ŝtato sendependa en tiuj landoj. Kuraĝan decidon ni proponas, konsistante en rekoloniigi la landojn, demeti netaŭgajn registarojn kaj eĉ ŝtatojn, eduki popolojn en la plej altaj atingoj de homaro, kaj post tio resti estante nur unu nacio mondscale, regita demokratie per reprezentantoj el ĉiu loko el la mondo, el ĉia kulturo. Tio estu antaŭfina paŝo por atingi finan solvon por ni, la homaro: ni uzu nur tion, kion ni bezonas, ni lernu feliĉiĝi.

Marta kaj Englebardo

Elrete

Ni trovis tiun-ĉi mesaĝon en Interreto. Pro ĝia intereso, ni transkribas ĝin, kune kun la reago al nia reago.

—Mesaĝe original—

De: RET-INFO <ret-info@esperanto.org>

Para: ret-info <ret-info>

Fecha: martes 23 de febrero de 1999 22:16 Asunto: ret-info: Likvido de Zamenhof-lernejo en Bjalistoko

Al geesperantistoj de la tuta mondo!

Ni, geinstruistoj de la Elementa Lernejo nr-o 23 je la nomo de *Ludoviko Zamenhof* en lia naskiĝurbo, Bjalistoko, ekzistanta de la 1959-a jaro, kiam okazis ĝia solena inaŭguro, en kiu partoprenis multaj geesperantistoj -partoprenantoj de la Jubilea UK el la tuta mondo, petas vin helpi savi nian lernejon.

Ĉi-jare ni festos la 140-an naskiĝ-datrevenon de Doktoro Esperanto kaj ni deziras ankaŭ festi la 40-an datrevenon de funkciado de nia lernejo.

Bedaŭrinde, nia direkto kaj estraro de bjalistoka Komunumo decidis likvidi nian publikan lernejon kaj transdoni nian sidejon al privata, romkatolika lernejo.

Ni opinias, ke en la naskiĝurbo de la kreinto de la internacia lingvo Esperanto ne povas malaperi la sola lernejo portanta nomon de tiu fama bjalistokano. Ne konvinkas nin la oficiala kialo, por kiu ĝuste nia lernejo devas esti likvidita: reformado de pola kleriga sistemo. Laŭ nia opinio tiu decido estas intenca politika agado de lerneja direkto kaj la Urbeŝtaro de Bjalistoko.

Ni akcentas, ke danke al niaj geinstruistoj kaj al nia lerneja junularo disvastiĝis rondo de nomoj interesigitaj pri popularigado de la internacia lingvo, En la urbo, en kiu naskiĝis la kreinto de Esperanto almenaŭ en unu lernejo devas esti instruado de la lingvo.

Ĝis nun en nia lernejo estis gvidita sistema informado pri la vivo kaj la agado de la kreinto de Esperanto kaj ankaŭ pri la lingvo, kaj pri ideo de esperantismo. Ĉiuj infanoj, kiuj deziris havis eblecon eklerni senpage la lingvon. Multaj artikoloj en loka gazetaro povas dokumenti tion.

Kune kun likvido de nia lernejo finiĝos la populariga agado pri la lingvo kaj esperantismo inter bjalistokaj infanoj kaj junularo.

Ni petas ĉiujn geesperantistojn pri helpo kaj perado ĉe ĉiuj bjalistokaj ŝtataj, lokaj urbaj kaj vojevodiaj aŭtoritatoj por ke, la lernejo je la

nomo L. Zamenhof ne malaperu el
bjalistoka lerneja mapo.

Ni anticipu ege dankas pro via helpo
kaj subteno - 46 geinstruistoj el la
lernejo.

Se vi povas transdoni nian informon
al viaj gekonatumoj.

Se vi deziras helpi al ni bonvolu
sendi retleterojn al:

-Urbeŝtaro de Bjalistoko / urbeŝtaro
de Bjalistoko S-ro Ryszard Tur:

<city@cksr.ac.bialystok.pl

<bpm@city.bialystok.pl

Kaj por ke ni sciu pri viaj leteroj al:

spnr23@polbox.com

aŭ perpoŝte al:

S-ino Nina Pietuchowska

str Piastowska 13/7

PL-15-207 Bialystok, Polio

Jen mia propra reago:

Gesinjoroj!

Mi petas, ke ne malaperu la lernejo
portante la nomon de Zamenhof, ĉar
li famigis Polion je la plej bona
maniero: disvastigante kulturon kaj
tolereman sintenon tra la tuta mon-
do. Eĉ se oni ne dividas tiun sintenon,
oni nepre devas respekti ĝin, ĉar la
malo kauzas militon, kies memoro
Polio ne havas feliĉa.

Jesuo de las Heras

Respondo:

Responde al via retletero pri likvido de
la Elementa Lernejo n-ro 23 en Bialystok
mi informas vin, ke rezulte de
enkondukata reformo de eduka sistemo
en Pollando, en la Elementa Lernejo n-
ro 23 je la nomo de Ludoviko Zamenhof
okazas laboroj pri ties transformado. La
lernejo funkcias kaj funkcios dum
almenaŭ 5 jaroj. Samtempe mi deziras
informi vin, ke ni prepariĝas al solenado
de la 140-a naskiĝdatreveno de la gran-
da bjalistokano, Ludoviko Zamenhof.
Alte taksante signifon de la kreinto de
Esperanto por nia urbo, la urbaj
aŭtoritatoj de Bialystok faros ĉion eblan,
por la solenaĵoj havu kiel eble plej
grandiozan karakteron. Aldone mi
deziras informi vin, ke ni tre zorgas kaj
flegas tradicion de Ludoviko Zamenhof.
Lian nomon portas interalie: la plej mo-
derna bjalistoka porinfana hospitalo, unu
el urbaj stratoj, la pompa placo, sur kiu
troviĝas monumento al la kreinto de
Esperanto. Krome la aŭtoritatoj de
Bialystok transdonis al la Fondaĵo de
Zamenhof konstruaĵon en la urbocentro
kontraŭ proverba unu zloty. Oni povas
ankaŭ mencii pri financa kunsubtenado
de Turisma kaj Kultura Informcentro,
kiu ankaŭ estas je la nomo de Ludoviko
Zamenhof, fare de Komunumo
Bialystok.

Altestime salutas vin

Marek Kozłowski

Vicurbestro de Bialystok

Respondo de samideanoj de Bjalistok:

Estimataj Gesinjoroj!

Koregan dankon pro sendita al bjalistoka urbestro letero subtenanta nian aferon /plua ekzisto de la Elementa Lernejo n-ro 23 je la nomo de L. Zamenhof.

Povas esti ke vi ricevis respondon de nia vicurbestro M. Kozłowski. Ni ankaŭ ricevis ĝin. Ni volas iom aldoni al ĉi tiu letero. Ĝi intence erarigas publikan opinion ne nur el la Esperanto-mondo. Jen kiel aspektas nuna situacio de la Zamenhof-lernejo: dum lernojaroj 1999/2000 estos 13 klasoj; 2000/2001 - 8 klasoj; 2001/2002 - 6 klasoj; 2002/2003 - 4 klasoj; 2003/2004 - 2 klasoj. Ĉar en nia sidejo estas ankaŭ XII Liceo jam parte likvidita dum lernojaroj 1999/2000 estos 4 klasoj; 2000/2001 - 2 klasoj. Ĉar oni ne antaŭvidas akceptadon al la unuaj klasoj de ambaŭ lernejoj: ĉi tiuj lernejoj tre rapide “mortos naturale”. Kiu subtenos nian sidejon por 6,4,2 klasoj, kiam en pola klerigado konstante mankas mono? Ni ne kredas al bjalistoka urbestro, ke nia lernejo plu ekzistos 5 jarojn / laŭ nia opinio max. 2 jarojn/. Kion poste? Kiam en la lernejo estos 6,4,2 klasoj tre facile oni povas ĝin likvidi ekz. translokante infanojn al najbaraj

lernejoj, ŝanĝante lernejan distrikton...

Kiel oni povas trakti la opinion de la vicurbestro: “ni zorgas kaj flegas tradicion de L. Zamenhof”, se neniu el invititaj urbaj eminentuloj partoprenis la 15-an de decembro 1998 solenan aranĝon en nia lernejo okaze de la 139-a naskiĝtago de la kreinto de Esperanto, de la Patrono de nia lernejo?

Kion oni povas pensi pri la fakto, ke ankaŭ neniu el lokaj eminentuloj partoprenis solenan kunmetadon de floroj apud monumento al L. Zamenhof en tiu sama tago? Ĉe la monumento estis nur lokaj geesperantistoj kaj junularo el nia lernejo.

Tio, kio nun okazas en la urbo kun komenconta la 1-an de novembro 1999 reformo de pola klerigado. Tio estas intenca agado de urbaj, bjalistokaj aŭtoritatoj. Tio estas provo por transloni komunuman havaĵon en privatajn manojn “kontraŭ proverba groŝo”. Povas esti, ke la 8-an de marto 1999 estos findecidota nia afero dum kunsido de la urba konsilantaro. Dankon pro Via agado por nia afero! Samtempe ni petas ĉiujn geesperantistojn plu helpi kaj subteni nin skribante al diversaj polaj kaj lokaj aŭtoritatoj.

*Geinstruistoj el Zamenhof-lernejo en
Bjalistoko*

Ziryäb, fama muzikisto kaj erudiciulo de Al- Andalus

Ziryäb estis genia muzikisto kaj erudiciulo de Al-Andalus, kromnomita *La Nigra Birdo* pro la bruneco de lia haŭto, klareco de lia voĉo kaj dolĉo de lia karaktero, sed lia vera nomo estis Abü-l-Hassän Ali ibn Näfi, naskiĝinta en Bagdado en la jaro 789. LI devenis el persa familio kaj lernis muzikon kaj kanton en la muzik-lernejo de la Bagdado-kortego sub la gvido de la majstro Ishäq-al-Mawsili.

Laŭ rakontas la historiisto Al-Maqqari en sia verko *Analeqtes*, Ziryab, talenta knabo, rapide lernis de sia majstro Isahäl, tiel kaŝe kiel eble, ne nur la teknikon sed ankaŭ lian ampleksan kanto-repertuaron kaj dank' al lia bela voĉo kaj lerteco, baldaŭ superis lian majstron en ĉiuj kampoj.

Iun tagon, en la palaco de la tiama kalifo Härün-al-Raŝid (766-809) oni menciis en konversacio la lernanton Ziryäb tiel laude, ke la propra kalifo sentis cedrtan scivolemon pri la juna muzikisto. Efektive, he la unua okazo, ke al-Mawsili vizitis la palacon, la kalifo demandis al la kanto-majstro ĉu li havas inter liaj lernantoj unu pli elstaran ol la ceteraj. *Jes, mi havas, unu sufiĉe lertan, li ruze respondis, ja mi aŭskultis al kelkajn melodiojn tre emociigajn, kiujn mi lernigis lin per nova sistemo mia, kiun mi konsideris adekvata al*

lia talento kaj artaj kapabloj. Aŭskultante tion, la kalifo alparolis la lernanton priesplorante per liaj respondoj kiaj estis la veraj kapabloj de la junulo. Ziryäb respondis per ĝentilaj elegantaj esprimoj: Moŝto, mi scias kanti tion, kio kantas ĉiuj bonaj kantistoj, sed granda aprto el mia privata repertuaro konsistas el kanzonoj destinataj nur al via kalifa moŝto. Se vi tion deziras, mi kantos antaŭ vi ion ĝis nun tute ne aŭskultata de iu ajn homo.

La tiamaj kronikoj rakontas, ke kiam Ziryäb jam estis preta komenci sian recitalon antaŭ Härün-al-Raŝid, oni donis al li la liuton de lia majstro, sed li ne akceptis ĝin kaj firme diris al la kalifo: *Sinjoro, mi havas mian propran liuton elpensitan kaj konstruitan de mi mem. Se via moŝto deziras, ke mi kantu laŭ la karakterizoj de mia majstro, mi*

akompanos mian kanton per lia liuto, sed se vi volas aŭskulti min laŭ mia propra stilo, mi tion faros per la mia. Tiam la kalifo prenis la liuton de Ziryāb kaj diris al li: Kaj tamen ambaŭ tre similas.

—*Pardonu, via moŝto, sed konstatu ke mia liuto pezas la trionon el tiu de mia majstro kaj krome ĝi havas aliajn avantaĝojn, kiujn mi povos ekspliki al vi en alia pli oportuna momento; ekzemple, la kordoj de la mia estas silkaj ne faritaj en varma akvo, la trian kaj kvaran mi faris per tripo de leono, ĉar ili havas resonajn, purecon kaj fajnakutecon pli belsonajn ol tieuj de aliaj bestoj per kiuj oni faras la ceterajn, akj alia avantaĝo, kiujn ili prezentas estas pli longa rezisto kaj pli delikata vibrado kaj kontakto sub la arĉo.*

Kaj tuj, kun la bonvolo de la kalifo, alkompanante sin de sia delikata instrumento, Ziryāb kantis kanzonon tute originalan dediĉitan al la kalifo mem, kaj li tion faris tiel mirinde boner kaj emociige, ke la kalifo restis tre agrable inpresita. Hārūn-al-Raŝid sin turnis al la majstro Isāq, riproĉis lin ne informi al li siatempe pri la grandaj kvalitoj de Ziryāb kaj montris sian volon ne nur reaŭdi la lernanton, sed ankaŭ kontribui per la necesaj financaj alportoj al la kompleta formiĝo de tiu granda artisto.

Ĵaluza al-Mawsili de la sukceos d esia lernanto, post ne longe citis al Ziryāb por sekrete konversacii kun li, en kiu la majstro eksplikis al la lernanto pri tiu kriza situacio inter ambaŭ, substrekante, ke line estis preta toleri rivalcojn en la kortego, do nepre li devas tuj decidi ĉu akcepti konsiderindan monokvanton kaj foriri eksterlanden aŭ resti ĉi tie sub lia konstanta mortminaco...

Ziryāb, kiu perfekte konis la duran temperamenton de sia majstro, tuj sciis ke tiu minaco ne estis simpla fanfaronajo sed reala danĝero por lia vivo, pro tio li decidis akcepti la monon kaj foriri kun sia familio eksterlanden, eble al la lontana Al-Andalus, lando regata de omajido, kies prestiĝo sub vidpunkto lirika kaj kultura tiel laŭde oni parolis en Bagdado.

Efektive, li kun sia familio vojaĝis al Nord-Afriko, de kie li adresis mesaĝon al la kordova emiro al-Hakam la 1-a informante lin, ke li sciis kanti, do, kun lia permeso li dezirus sin prezenti en la Kordova Kortego.

Al-Hakam akceptis la proponon, akj Ziryāb kun la siaj enŝipiĝis survoje al Al-Andalus, sed apenaŭ alvenitaj ĉe Alĝeziro, li estis informita pri la forpaso de la emiro. Okupis tiun plej altan postenon lia filo, Abd-alRahmān la 2-a, kiu, apenaŭ eksciis pri la alveno sur la al-andalusa teritorio de

la kantisto, ne nur konfirmis la inviton de lia patro, sed ordonis, ke komisiono de la propra kortego prezidata de la juda kantisto Manūr-al-Yahudi, iru al Alĝeziro por komplimenti kaj sekve akompani al la invito ĝis Kordovo.

Ziryāb venius akompanata de siaj edzino, filinoj Ulayya kaj Hamdünā, la sklavinoj Gaslān kaj Humajda kaj sia lernanto Muta. Alvenis al al la al-andalusa ĉefurbo la muzikisto kun sia sekvantaro dum nokte, kaj laŭ ordono de la emiro ili okupis unu el la plej bonaj domoj de Kordovo, kaj post tritaga ripozo, Abd-al-Rahmān invitis lin sin prezenti en palaco kaj kanti en la kortego.

Tiel multe la kanto kaj la persono placis al la emiro, ke ambaŭ rapide intimiĝis kiel tre bonaj amikoj. La emiro montriĝis tre malavara kun la kantisto: asignis lin pli ol 40 000 dinaroj po jarekrom donaco de pluraj kampo-domoj, kaj kiam la emiro konsideris, ke li estis sufiĉe bone pagata, invitis la kantiston ofte viziti la emiran palacon kiel unu el siaj preferataj invititoj.

Cetere Ziryāb baldaŭ montriĝis kiel genia muziko-renoviganto kaj vera erudiciulo, ja li krom muzikisto kaj kantisto, li perfekte regis geografion, astronomion, fizikon, meteologion, beletron, ktp. Estis vera ĝuo aŭskulti lin paroli pri landoj, moroj, saĝaj homoj el diversaj civilizacioj kaj pri mil aliaj diversaj anekdotoj aŭ opinioj pri scienco, poezio kaj arto... Rilate poezion, li instruis la poetojn de la kordova kortego pri la antikva kaj moderna poetikoj, pri stiloj, versoformoj kaj sekretoj por la bona rimado. Pri muziko, laŭ rakontas unu el la tiamaj historiistoj, ibn Hayyān, en sia verko *Almoctabis*, li elpensis kaj uzis la plektron el aglo-plumo, grava avantaĝo rilate la antaŭan el ligno, ĉar mildigis la kontakton kun la kordioj kaj eltiris pli fajnaj sonoj. Li riĉigis la liuton per la kvina kordo; tiurilate komentis la tiuepokaj fakuloj, ke la antikva

liuto havis nur kvar kordoj: la unua (akutkordo) estis flava kaj simbolis galon; la dua estis ruĝa kaj simbolis sangon; la tria, blanka, simbolis flegmon; kaj la kvara, nigra, borduna kordo, simbolis melakolion. Mankis al tiu liuto la animo, kaj tial Ziryāb aldonis centran ruĝan kordon, kaj tiel la instrumento akiris pli delikatan esprimon kaj sin montris pli kapablan por aliaj studoj aŭ uzoj. Li ankaŭ estis la kreinto de nova muzik-sistemo, kiun li prezentis sub la simbola formo de arbo: la Arbon de la Temperamentoj (Chajarat-attubū), tio estas, la arbo de la modoj. Por indiki la *modon* aŭ melodian stilon, speco de oktavo de Abū-l-Faray**, Oriento adoptis la vorton *maqān* (loko), kiu indikas la tonogradon. De tiu momento, de la manod e Ziryāb, Al-Andalus uzos vorton kun pli vasta signifo: *tāba* (naturo), kiu resumas la rilatojn de la homo kun aliaj vivantoj kaj estaĵoj. La diferenco inter ambaŭ skoloj jenas: la unua, ĉio tekniko, la alia artomistikismo.

Sed estis precipe en la regado de la muzikformoj, ke la talento de Ziryāb montriĝis meritoplena: la pretigo de la *nūba**** tiel kiel ĝi nun ekzistas, ka tio jam estas rimarkebla en ĉi tiuj paragrafoj de Al-Maqqari: *la kutimo starigita en Al-Andalus komenci muzikan recitalon per kanto-recitado kaj ia ajn ritmo kun eventualaj sangoj, t.e., (kontraste kun la tiamaj reguloj kaj kutimoj) ligi movon largan de komenco kaj fini ĝin per alia pli rapida, laŭ starigis la majstro Ziryāb.*

Temas pri kohera kaj unueca muzik-formo, kiu sin anticipis al tiu problemo aperonta kelkaj jarcentoj poste.

La talento de tiu eminentulo estis tiel eksterordinara kaj estistiel alte admirata, ke oni murmuris en la sino de la popolo, *ke li estas vizitata dum la nokto antaŭa al liaj recitaloj de la genioj kiuj dum sonĝo inspiris lin, ne nur por elpensi originalajn kanzonojn sed ankaŭ la muzikon.* Sed, kompreneble, tio

estas onidiroj frukto de la admiro kiun li vekis, la vero nur Alaho scias.

Tiu ĉi majstro, aŭtoro de pli ol dek mil kanzonoj, kvanto neniam atingita de iu ajn alia muzik-verksito, fondis konservatorion pri la kant-arto kaj muziko, kiun li mem gvidis kaj majstris dum longaj jaroj, funkcianta en palac-salono de la kordova emiro.

Ziryāb estis vera idolo de tiu urbo: neniu kiel li sciis prpari poezian aŭ muzikan feston pli bone ol li (tre oftaj en tiu epoko) elekti la adekvatajn poetojn en ĉiu kazo, kaj pretigi la necesajn elementojn kontribuontajn al la kreo de konvena etoso kaj por ekzalto de la motivo de iu ajn difinita festo. Li zorgis pri ĉio, de la tablotukoj, kies lina konsisto li laŭmode anstataŭigis per aliaj ledaj, ĝis la glasoj kaj teleroj, antaŭe oraj aŭ arĝentaj, kiuj per lia iniciato ŝanĝis por tiuj kristalaj.

Laŭ sugestoj de Ziryāb, la kordovaj korteganoj lernis vesti sin laŭmode per vestokoloroj adekvataj al ĉiuj sezono, kombi sin laŭ pli originalaj formoj, manĝi fajnstilo aŭ konversacii pri intelektaj kaj seriozaj interesaj homaj temoj. Resume, li kreis tute novan socion en la emiria ĉefurbo, organizante la intelektan mondon de Kordovo, en tiu momento unu el la plej gravaj de la mondo. Multnombraj poetoj, scientistoj kaj simplaj homoj kun sci-soiffo venis kvazaŭ pilgrime el la tuta Eŭropo al Kordovo viziti la itelektajn centrojn, verajn fokusojn pri scio de Okcidento.

Ziryāb lernigis sian sklavinojn Gaslan kaj Humayda kaj lian lernanton Muta, siajn grandajn sciojn pri muziko kaj kanzonoj, kaj dum jaroj kaj jaroj oni elvokis lian figuron kiel mago de la muziko kaj plej alta pinto pri kanto-arto en Okcidento. Liaj kanzonoj estis zorge kolektitaj kaj konservitaj de Aslam ibn Abd-al-Aziz, homno perfekte sicanta ĉiujn kanzonojn de Ziryāb kaj ankaŭ

kapabla ludi la muzikon de la eminenta artisto.

La skolo kaj muzikteorioj de Ziryāb fariĝis tradiciaj en Al-Andalus dum pluraj jarcentoj kaj preterpasis marojn kaj landlimojn ĝis atingi la Orienton, kei ankaŭ estis tre admirata.

La fama muzikisto kaj erudiciulo de Al-andalus, Ziryāb, forpasis en la jaro 857.

Antonio Marco Botella

Ĝis revido, Stan!



Antaŭ kelkaj tagoj mortis Stanley Kubrick, la homo kiu enkondukis al ni la XXI-an jarcenton, per sia *2001, spaca odiseo*. Li ankaŭ avertis nin pri turpaj solvoj de perforto per sia *Mehanika homo* (*A clockwork orange*, 1971) kaj malsakrigis vjetnaman militon per sia *Metala ŝako*. Ni bedaŭru, ke li mortis, sed ni plivivigu lin per vidado de liaj majstraj filmoj.

BUS-KARAVANO AL LA UK DE BERLINO

Grupo Esperanto de Valencia organizas vojaĝkaravanon al la Universala Kongreso de Esperanto en Berlino (Gramanio), laŭ la jena programo:

29-a julio: Frumatene, eliro de la aŭtobuso de Valencia. Alveno en Genevon (Svislando) fruvespere kaj tranoktado, kun vespermanĝo..

30-a julio.- Matenanĝo. Eliro el Genevo kaj alveno en Munkenon (Germanio), kun tranoktado kaj vespermanĝo.

31-a julio.- Matenanĝo. Eliro de Genevo kaj alveno en Berlinon posttagmeze. Tranoktado.

Restado en Berlino kun tranoktadoj kaj matenanĝoj, **ĝis la 7-a de aŭgusto.**

7-a aŭgusto.- Tagmeze, eliro de Berlino, kaj vespere alveno en Torun (Pollando), kun partopreno en la 9-a Internacia Esperanto-Kongreso. Restado en Torun, kun tranoktado nur, kaj partopreno en la programo. Eventualaj tuttagaj ekskursoj :

1.- Al la belaj urboj Dancing , Sopot kaj Gdynia, ĉe la Balta Maro, kaj al la impona kastelo de la templariaj kavaliroj en Malbork

2.- Al la ĉefurbo Varsovio.

11-a aŭgusto.- Eliro de Torun, kaj survoje al Prago ebla halto por viziti la plej faman dipatrinan pilgrimejon de la

tuta orienta Eŭropo, Chenstochova. alvenon en Pragon. Tranokto kaj vespermanĝo.

12-a aŭgusto- Matenanĝo, eliro kaj alvenon en Zurich (Svislando). Tranokto kaj vespermanĝo.

13-a aŭgusto.- Matenanĝo, eliro kaj nokte alveno en Valencion.

La vojaĝo okazos per moderna kaj komforta aŭtobuso. La prezo kun loĝado en dultitaj ĉambroj, ĉiam en urbocentroj (ankaŭ en Berlino), estos entute ĉirkaŭ 90.000 hispanaj pesetoj, se aliĝas pli ol 30 homoj.

Oni akceptos **maksimumon de 35 vojaĝantoj.**

Por tiuj kiuj ne deziras vojaĝi per la aŭtobuso, oni disponigas **ĉambrojn en Berlino por 4.200 pesetoj persononokto**, en dultita ĉambro, en la urbocentro de Berlino, ĝis kiam jam ne restos pli da liberaj litoj en la hotelo. Tiuj kiuj deziras unulitan ĉambron devos pagi aldonan sumon.

Pli da informojn petu al **Augusto Casquero**. Telefonnumero **96 3401369**, je la manĝo-horoj nur.



Virgaj plumoj

Infana afero

Kandido vokis min aparte, per gesto sia. La ĉambro estis plena da personoj, kaj li ne ŝatis pardonpeti publike. Neniu ŝatas tion, mi supozas. Sed verŝajne li ne suferis multe pro tio. *Mi devas paroli pri kio okazis antaŭ kelkaj tagoj*, li anoncis. *Ĉu vi ankoraŭ memoras pri tio?*, mi respondis. *Bone, mi nervozis, familiano mia malsaniĝis. Finfine, ni entombigis lin hieraŭ.* Li silentis. *Mi komprenas, mi diris. Sed ne gravis multe al mi tio, kion ni diris unu al la alia, Kandido. Se ni ĉiam konsentas, vivo estus tro malamuzo*, mi aldonis, klikante mia sana okulo. Sed vere mi estis tiu, kiu pikis lin. Bona Kandido nur diris al mi, ke se mi ne vidis ĝin, mi ne povis paroli pri la afero. Certe, silentigi min enhavas riskon. *Eĉ se mi ne vidis, mi parolis al implikitoj, kaj ankaŭ mi rajtas opinion.* Mia amiko replikis: *tute ne!* Eble mia amiko ne komprenis tion, kion mi diris tiam: *Kio okazas, estas ke vi ne kredas je libereco pri opinii, etulo. Sed rigardu: mi ekzempligos similon: ankaŭ vi ne estis tie, kiam oni malkovris Amerikon, kaj vi povas paroli pri la afero. Vi eĉ povas klarigi vian opinion. El la vidpunkto de indianoj. Aŭ el tiu de Kolombo. Aŭ el tiu de la Reĝo de Aragono. Aŭ el tiu de judoj senlandigitaj el Kastilio tiudate...* Mia amiko jam delonge turnigis sian fingron kontraŭ sia tempio, kvazaŭ li ŝarĝus sian mekanismon kapan.

Nu, ni pagu, interrompis Ambrosjo, mi supozas ke por rompi la buklo..., aŭ almenaŭ por ke ni ekiru. Mi, por malfuŝi la aferon, diris: *mi pensas ion pli bona: pagu Kandido!*

Kaj nun, tri tagoj poste, la paginta Kandido senkulpigas sin. Infana afereto, mi konkludas..!

Kio farendas

Tio estas rakonto malreala, kiel vivo mem. Ni supozu, ke vi konas virinon pere de Interreto. Supozu, ke ŝi trairas malbonegan momenton: ŝia nura filo ĵus mortis. Ŝi skribas serĉante forgeson pri sia doloro, sed vi estas grizaj personoj, ideosenhavaj kies parolo estas aĉa, sen imageco. Vi nur povas legi ŝin. Kaj respondi per sensencaj aferoj. Ŝi venkas ŝian doloron iom post iom, ĉar ŝi nun nur petas, ke iu ajn estu proksime de ŝi. Kaj tiurilate vi ja helpis ŝin.

Tempo pasas, kaj tagon venas vidi vin. Danki vin pro tio, ke vi estis tie. Ŝi ankoraŭ belas. Ŝi ŝajnas kaj parolas sinjorine; ŝia kompanio gravigas iun ajn. Ŝi alportas ion brilan kaj rutinajn.

Nun vi ĉiuj scias kio farendas, anstataŭ perdi vian tempon kun *interretaj novaĝgrupoj...*

Vulpo

ĈU PROFITO, AŬ ALTRUISMO?



La nuntempo, precipe en certaj industriaj landoj, karakteriĝas per la nomata *bonfarta socio*.

La nuna prospero eĉ ne estis elpensita en la antaŭaj jarcentoj. Krome, ĉiuj ideologioj hereditaj de la pasinta naŭdekjara jarcento ne sukcesis, kaj la nuntempaj homoj kredas nenion. Celas la bonfariton kaj nenio pli kaj plu.

Tiu ĝenerala sinteno ankaŭ tuŝas nin, esperantistoj. Ni ne atingas altiri la junulojn kaj nia movado preskaŭ stagnas. Antaŭ tiu fakto oni alvenas al la konkludo, ke se Esperanto restas nur idealismo sen iu ajn materia profito ĝi ne havos alian sorton ol morti. Tamen tiu konkludo povas esti erara. Nuntempe ankaŭ estas plena de idealismoj. La etnaj naciismoj, kiuj retrorigardas la pasintecon estas nuraj revoj al pasintaj tempoj neniam ekzistantaj. Multaj aspektoj de la bonfarta socio ankaŭ estas sinteno por reliefigo de propra personeco.

La nuna materialismo sen kiu ajn rilato al intelektaj

valoroj nur kondukas al divoĉado kaj al la drogoj, sed kvankam ĝi forte tuŝas la junulojn, restas tre minoritata. La elfalo de la tradiciaj valoroj estas la precipa faktoro de eskepticismo. Alie, ankaŭ proliferas la plej fanatikaj ideologioj sin apogante en la terorismo. La socia aspekto de nia socio estas de malorientiĝo.

Kion denove diri pri Esperanto kaj la esperantismo? Esperanto kiel lingvo apartenas al la scio, kaj la esperantismo estas en rilato al la edukado por tutmonda paca kunvivado.

Tiel same la scio kiel la eduko ne aldonas tujan profiton. Antaŭe, krom la ĝenerala alfabetismo, multaj homoj nur ĉeestis elementajn lernejojn. Hodiaŭ en la industriaj landoj granda parto de la junuloj studas en la universitato. La nuna instruado estas longtempa kaj multekosta. La junuloj pergajnas sian vivon, precipe la universitatanoj, kiam antaŭe oni konsideris ilian aĝon kiel maturulojn. La nuna instruado estas multekosta, la profiton oni atendas post multaj jaroj, tamen sen tiu altiĝo de la instruado la bonfarta socio estas neebla. En multaj landoj la naturo estas alte fruktodona, sed pro manko de instruado kaj eduko restas

mizeraj. Analfabetoj ne kapablas regi industrian socion kaj sen civitana edukado ĉiuj politikaj reĝimoj malsukcesas.

Ni ne esperu, ke pro tujaj materiaj avantaĝoj la esperantismo prosperu. Ni devas atendi la alvenon de favoraj cirkonstancoj. La nuna socio tiel rapide riĉiĝis, ke la plej multo ankoraŭ restas en la fazo de novriĉuloj. Granda materia ĝuado kaj mensa malstreĉiteco. Sed tia situacio sendube estas efemera, ankaŭ la novriĉuloj, post ŝatiĝo, deziras sin kulturiri. La kvanta vivnivelo pli frue aŭ malfrue aspiras kvalitan vivnivelon en la scio, arto kaj intelekto. La spirita ĝuo estas senlima kaj ligita al la altruismo.

Esperanto estas lingva scio, sed tio ne estas la plej grava. Tio grava estas la eduka faktoro de la esperantismo. Nia aktuala mondo pro materiaj faktoroj, kiel la komunikado kaj la ekonomio havas proceson de planediĝo. Multaj reakcias al la planediĝo per retrorigardo al la pasinteco kaj proliferas naciismoj. La planediĝo sen tutmonda eduka civitaneco povas disvolviĝi kun gravaj krizoj de kunvivado. La edukado por tutmonda civitaneco estas la precipa rolo de la esperantismo. Kiel eduka tasko la profito ne estas tuja. Atingi tutmondan pacan

kunvivado estas la plej granda profito de tiu laŭŝajne senprofita laborado de la esperantistoj.

(Novembro, 1998)

Giordano Moya.



La vojo de la hispanaj respublikanoj

Dum la lasta kongreso de UEA ni malkovris tiu eta enkonduko al la Kongresejo. Malgajas, ke oni identigas respublikon kaj militon en Hispanio. Malgraŭ la 23-a de februaro, malmankas respublikanoj en Hispanio, kaj estus multaj pli, se oni komprenu, kion *respubliko* signifas. Ambaŭ hispanaj respublikoj estis bojkotitaj de monarĥiistoj kaj maldemokratiistoj, sed *respubliko*, laŭ etimologio, volas diri nenion alian ol *afero publika*, kaj tio volas diri, ke ni respublikanoj firme kredas, ke la nacio apartenas al ni ĉiuj, kaj ke ni ĉiuj devas kunlabori por regi kaj progresigi ĝin. *Monarĥio* volas diri, ke ĉio -eĉ rego- apartenas nur al *unu* persono...

Tamen, dankinda afero estas, ke montpelieranoj dediĉas vojon al ni, hispanaj respublikanoj. Dankon.

Ni savu nian kulturan trezoron

Konfesinde estas, ke tiu ĉi ideo ne estas mia, sed mi opinias ĝin taŭga kaj proponenda al la membraro, kiu juĝos kaj poste reagos laŭplaĉe.

Estas bedaŭrinda fakto, ke mjltaj kamaradoj loĝas izolitaj aŭ ne havas familianojn scipovantajn Esperanton. Tio ĉi okazigas, ke ties bibliotekoj ofte finas sian vivon en mansardo, brokantejo aŭ eĉ foje en rubujo. En Esperantio, kie ofte mankas rimedoj por eldonado aŭ, al individuoj, mono por aĉeti librojn, tio estas nepardoninda peko. Al novaj gekamaradoj ne eblas legi en Esperanto bonajn verkojn kiuj jam elĉerpiĝis kaj ne estas reeldoneblaj.

La prpono estas jena:

- Ĉiu kamarado, kiu volas malhavigi librojn kaj gazetojn malnovajn, ilin sendu al la peranto de la libroservo.

- Tiu ĉi kvintancos kaj aperigos en la asocia organo liston de la materialo.
- Kiu volos ion el la listo, ĝin mendos al la libroservo kaj pagos nur la afrankon.
- Se iu kamarado volus, oni povus vendi la materialon, je modera prezo, favore al la asocio.
- Preferon havos HALEanoj kaj SATanoj.

Nu, oni povas diskuti tiun ĉi proponon, forstreki aŭ aldoni ion. Eble estus bone ne doni la taskon al la libroservo, sed starigi specialan servon. Atendataj estas la reagoj.

*Januare de 99-a,
la respondeculo de la Libroservo*

Lasta kunveno de HALE.

Je la 23-a de novembro kunvenas Prezidanto María del Mar Guirao Gallego, kamaradoj Marteno Bustín Benito, José María Bernabéu Franco, Johano Antono Cabezos Martínez kaj Iván Molina Valverde, agante kiel sekretario Jesuo de las Heras pro neveno de José Pina Tuells, laŭ la tagordo:

- 1 Demisio de Prezidanto.
- 2 Elekto de nova estraro.
- 3 Organizo de Kongreso de Hale.
- 4 Rilatoj kun sindikatoj kaj similaj organizoj.
- 5 Libroservo.
- 6 Informoj, proponoj kaj demandoj.

1 *Demisio de Prezidanto.* Kamarado Bustino Benito demandas kial María del Mar Guirao Gallego estis nomumita prezidanton, ĉar laŭstatute ŝi devas anstataŭi la prezidanton ĝis la nomumigo de nova prezidanto, sed ne prezidantiĝi.

La subskribinto diris, ke oni decidis tion preskaŭ unuanime en Valjadolido. *Oni ne plu devas fari tion, oni legu la statuton, por ne plu ĝeni la samideanojn*, ni konsentis.

Tri voĉoj kontraŭ unu akceptis demision de prezidanto María del Mar.

2 *Elekto de nova estraro.* Kamarado Johano Antono Cabezos Martínez prezentis kandidatiĝon konsistante de: **Prezidanto:** li mem, **Vicprezidanto:** Nikolao Ŝil Karbajo, **Sekretario:** José Pina Tuells, **Kasisto:** José María Bernabéu Franco, **Libroservo:** María del Mar Guirao Gallego, kaj **Redaktoro:** Jesuo de las Heras. Kandidato Cabezos klarigis, ke tio estas kondiĉe ke kamarado Ŝil akceptos sian postenon, ĉar li ne povis kontakti lin sufiĉe frue por la kunveno.

Ni balotis kaj elektis la novan estraron, krom unu sindeteno.



- 3 *Organizo de Kongreso de Hale.* Dum la venonta 17/18 de aprilo okazos la 1^a kongreso de HALE en Lorko, Mursjo, samtempe al la 10^a Kongreso de VEF.
- 4 *Rilatoj kun sindikatoj kaj similaj organizoj.* Ĉu oni sendu afiŝojn de HALE al sindikatoj, kun adresoj de la grupo aŭ individuaj esperantistoj kiuj simpatias al NKL (CNT).
- 5 *Libroservo.* Jam solvita. Kamaradoj Ŝil kaj Guirao interŝanĝas siajn postenojn.
- 6 *Informoj, proponoj kaj demandoj.* 1 Publikigi la statuton de HALE dulingve, 2 Fari bazdaton de civila agado, 3 Insignon de HALE oni devas fari. Finfine oni konsentas, ke ĝi estas la stelo kvinpinta iomete turnante maldekstren kun la vorto HALE ene de si, kiu aperas en la sekcio *Informoj de la Prezidanto* en ĉi tiu magazino (paĝo 4-a) kaj ankaŭ je paĝo 16-a. 4 Oni pagas la kvoton de Esperanto-Hispanio por la jaro 1998. 5 Kasisto Bernabéu donas artikolon verkitan de A. Marko Bottella al la redaktoro. 6 Oni decidis ankaŭ pliallogigi la kontnumeron de HALE en *Kajeroj el la Sudo*. 7 Finfine oni agnoskas, ke kamarado Marteno Bustino Benito kunvenas ankaŭ kiel peranto de SAT.

*Eventuala sekretario,
Jesuo de las Heras*



Informilo Inter L.E.A. -oj de S.A.T.	Redaktoro: Alan Gould [AGO] Woodrising, Thom Lane Goshill, North Lincs. England DN19 7LU Tel: +44 (0)1469 530356 E-Mail: alan@agolincs.demon.co.uk
---	---

LoLo numero ses - Februaro 1999



Prezidantoj
kreigas
tut-mon-
dan ligan
pere de
LEA-oj.

*Ivo Peyraut - Prezidanto de SAT-
PKK. Foto: Esperanto [USA]*

BONVENU AL LA

AKTIVULARO!

Post reaperigo de LEA-Ligilo (LoLo 5) en Novembro 1998, Guy Cavalier, Prezidanto de la LEA-Komitato kaj Ivo Peyraut urĝe diskutis inter si kiel utiligi tian servon kreinta de LEA-K.

La du prezidantoj konsciiĝis, ke jam Ivo proponis al la 1997 LEA-Komitato, ke tia ligilo povus havebligi plivaste ol nur al LEA oficistoj. Tiu LEA-Komitato konsentis kaj varme bonvenis, ke k-do Peyraut sin proponis efektiviigi tiun laboron precipe rilate al SAT-perantoj kaj Ĝeneralaj Konsilantoj. (Vidu LL n-ro 4).

Ili ankaŭ konsciiĝis, ke ankoraŭ suferas la tuta aktivularo de SAT manko de la servo liverita de la SAT Interna Ligilo (SIL) nun bedaŭrinde ne plu aperanta. Mi mem diskutis eldonon de SIL kun Ivo

dum la 1996 SATEB jharkunveno. Lia fervoro pri la graveco de plibonaj komunikoj inter diversaj eroj de SAT, ja eĉ ekstere, kuraĝigas min 'pri la stranga tasko fari ĉi tiun ligilon.

Ĝoje mi lernis de Guy ke nun LoLo iras al la tuta aktivularo de SAT, preskaŭ cent entute. Per tio ni povas efektiviigi ligojn inter LEA-oj, SAT-perantoj, ĜK-anoj kaj ekze. Ĉiu faka kaj frackia agadulo. Prave diras Ivo, SATanoj... bone kunlaboras preskaŭ ĉie. LoLo bonvenas ĉiun, kiun volas legi ĝin aŭ uzi ĝin por promocii siajn celojn. Ju pli multe, des pli bone!

AGO.

Amikeca reto.

Alia turismo
al alia mondo

400 adresoj en 50 landoj.

AMIKECA RETO povas esti utila por varbi por Esperanto tra konkreta pruvo de ĝia utileco. Tamen mi ne plu prvas mem fari en Babelion: tio levas informpetojn ne mastrumeblajn laŭ niaj fortoj: ili petas dokumentojn en nacia lingvo, kaj nenio eblas, se ili ne regas nian lingvon... Kelkaj eĉ mendis la libron kaj resendis poste.

Do, preferinde la LEA-oj povas uzi la ideon de Amikeca reto por montri realan uzon de Esperanto. Niaj perantoj povas helpi en presado de nacilingvaj tekstoj.

Amikajn salutojn de Gerardo Rollin kaj de

AMISDEKA RETO

88 Rue Victor Hugo

4R-37400-AMBOISE

a.reto@france-association.com

http://www.creaweb.fr/a.reto/

RECIPROKA GASTIGADO? Kial ne?

Ĝenerala Konsilantaro

Grava peto de Pelle Persson, Sekretario de Konflikto-Komisiono (K-K)

Karaj gekamaradoj!

Bonvolu helpi min trovi gekamaradojn kiuj volas akcepti la taskon esti "Ĝenerala Konsilanto de Kategorio A". Nun estas nu en 8-a horzono (Aŭstralio) kie jam funkcias Ĝ.K.-ano de Kat. A. Se4 vi trovas kandidaton, bonvolu informi tion al:

P. Person

Svartsiksvägen 14

SE-12352 Farsta

Svedio

E-poŝtio: Pelle Persson

<persson.esperanto@stockholm.mail.telia.com>

LEA-aj komitatoj, sekretario k.t.p. bv. noti:

Bonvolu atentigi, ke dum trolonge via Ĝenerala Konsilantaro apenaŭ funkcias pro manko de sufiĉe da konsilanoj.

SAT statuto rajtigas ĉiu LEA-ojn konvencie ligita kun SAT havi po unu reprezentanto ĉe Ĝ.K. Vi do nepre respondecas certigi ke la interesoj de viaj membroj pritraktiĝas tie.

La Ĝ.K.-aro konsistas el anoj elektitaj per:

- a) Geografia sektoro;
- b) Konflikto-komisiono;
- c) Urbano kie P.K. sidas;
- ĉ) Lea-oj;
- d) SAT-fakoj.

La sekretario de Konflikto-Komisiono estas ankaŭ sekretario de la Ĝenerala Konsilantaro (AGo)

KIAL LA LEA LIGILO?

Roy Lynn (SATEB), kreinto de ĉi tiu ligilo revuas progreson.

Mi esperas, ke aliuoj respondos al la supra demando. Sendube ĉiuj anoj de la LEA Komitato subtenas la proponon reaperigi ĝin, sed ĉu ĉiuj havas ideojn pri la taŭga enhavo?

Kial la LL unue estis diskutita, mia propra ideo tiamokaze estis, ke la diversaj LEA-anoj povus sendi kontribuojn por presado. Tiuj kontribuoj, ĉu artikoloj aŭ leteroj, povus raporti pri lokaj agadoj kaj spertoj en la klopodoj konstrui la LEA-ojn. Ili povus eĉ proponi metodojn por kunlaboro inter LEA-oj.

Mia opinio, en la ĝisnunaj eldonoj tiaj elementoj sufiĉe alvenis.

Due, mi antaŭvidis konsiladon al SATanoj (kaj ne SAT-anoj) en tiuj landoj kie ankoraŭ ne ekzistas LEA-oj por helpi starigi ilin. La estonto de SAT dependas je la kreado de pliaj LEA-oj ĉar tiuj nature agas (mi esperas) kiel varbantoj kaj subtenantoj de SAT - "rezervujo" laŭ la Statuto.

Estas mia kompreno, ke ne necesas minimuma membro-ciferon por rajtigi starigon de nova LEA. Do, ĉu ni povus helpi pere LL, la starigon de LEA-oj ekz. en Japanio, Ukrainio, Bulgario, Kroatio, Brazilio, ktp?

Ĉu la kamaradoj diverslokaj komprenas, ke NE necesas, ke ĉiuj ano de LEA estu individua membro de SAT?

Iu, kiu kredas, ke SAT ankoraŭ necesas kiel ilo por la progreso de la tutmonda laboristaro, ankaŭ havas respondecon plifortigu ekzistantajn LEA-ojn aŭ helpu starigi novajn laŭ lokaj eblecoj.

Red-a noto:

Mi tute konsentas kun ĉi-supraj esprimitaj sentoj de Ron Lynn.

La unueca celo de via LEA-Ligilo estas kaj ĉiam estos servi ĉiun LEA-on kaj LEA-membron per interŝanĝo de novaĵoj kaj informeroj.

GRAVAJ DATOJ:

**72-a kongreso de SAT
(99 LEA-Komitato dume)
1999-07-24/31**

**LEA-Ligilo numero 7
Poŝtdato 1999.07.02
Limdato 1999.06.11**

BONA NOVAĴO:

Antaŭnelonge de PREM

73-a Kongreso de SAT en Moskvo

El Parizo venis informo, ke invito de moskvaj membroj de SAT al SAT-kongreso en la jaro 2000 estas akceptita.

Nikolao Gudskov: a/k 57, Moskvo.



Esperanto asocio de Sabadell inaŭguras straton.

Verda kvinpinta stelo jam estas en montrilo de strato de Sentmenat ekde la dimanĉo 15-a de novembro de 1998.

Kvardeko da homoj konsistanta el najbaroj, anoj de la Kultura Asocio Esperantista, prezidata de José María Galofré, kaj anoj de loka konsilo, kunvenis je la strato kiu elde nun havas la nomon de la lingvo kreita de Doktoro Zamenhof.

La urbestro, Josep Villaró, signalis la valoron de Esperanto kiel *idiomon de komunikado super ĉiu ajn patrina lingvo*. Galofré donis la reprezentantojn de la urboregistararo pergamino memore de la tago. La inaŭguro de la strato, en la nova sektoro rezidenta de El Pedró, enkadriĝis en la festoj de Sant Menna.

Enkonduko en muziko

Lastartikole mi promesis reveni al la origino de la nomoj de notoj.

Guido d'Arezzo estis monaĥo de la jarcento deka, kiu havis la ideon aranĝi notojn laŭ akuteco kaj alteco, name tiujn pli altajn notojn li metis je la pli altaj lokoj sur peco da papero. Por mezuri kiel alte la notoj estas, li uzis kvar linioj paralelaj, kiun li nomigis *tetragramon* (kvar+grafiko). La notojn li nomigis per silaboj, kiujn li prenis el himno de Sankta Johano:

*UT queant laxis,
REsonare fibris,
MIra gestorum,
FAMuli tuorum,
SOLve polluti,
LABii reatum,
Sancte Joannes.*

UT estis anstataŭgita de DO poste, ĉar ĝi ne sonis sufiĉe mole, kvankam en Francio oni ankoraŭ uzas ĝin *nur por nomi* la noton, sed ne por solfai (por tio oni ankaŭ uzas *do*). Guido d'Arezzo uzis nur *ut re mi fa sol kaj la*, sed je la jarcento 16a oni enkondukis SI (el **S**ancte **I**oannes).

Skalo estas aranĝo de la sep notoj laŭ tiu ĉi ordo: 1 do, 2 re, 3 mi, 4 fa, 5 sol, 6 la, kaj 7 si. Tiu serio finas ripetante la unuan noton denove: 8 do. Tiel ni atingas kion oni nomas *oktavon* en muziko: serio de ok notoj sekvante unu la alian. Pro tio, ke ni komencis per **do** kaj finis per **do**, ni havas **skalon de do**.

Inter ĉiuj du notoj estas *intervalo* de unu *tono*. *Intervalo* estas la *distanco* aŭ diferenco pri sono inter du notoj, kaj oni mezuras ĝin kontante la nombron de notoj kiuj estas inter ili, kontante ilin ambaŭ. Oni diras, ke en la skalo, kiun ni ĵus difinis, la intervalo aŭ distanco inter la du **do** estas *oktavo* aŭ *oko*. Inter **do** kaj **re** estas, kompreneble, intervalo de *duo*. Inter **do** kaj **mi** estas intervalo de *trio*. Inter **do** kaj **fa** estas intervalo de *kvaro*, inter **do** kaj **sol** estas intervalo de kvino, inter **do** kaj **la** estas intervalo de seso, kaj inter **do** kaj **si** estas intervalo de sepo. En kelkaj lingvoj, inter ili la hispana, oni preferas uzi la adjektivan finaĵon, sed mi konsideras, ke estas pli taŭge uzi la substantivon, ĉar oni uzas la koncernan vorton por nomi *koncepton*, ne *kvaliton*. Tamen, se vi sentas vin pli komforta pri ajektivoj, vi ankaŭ povas uzi *intervalon duan*, *trian*, ktp, kondiĉe, ke oni komprenigas la vorton *intervalon*, eĉ se ne diritan.

Ni komentis pri **la skalo de do** antaŭ. Sed se oni komencas ne per do, sed per re, kaj havas la sinsekvan serion 1 re 2 mi 3 fa 4 sol 5 la 6 si 7 do 8 re, oni havas **la skalon de re**. Skalo estas same kiel *ŝtuparo* aŭ *eskal* koncerne al tio, ke oni uzas ilin por iri supren, aŭ suben: ja nia voĉo povas supreniri aŭ subeniri per skalo. Se oni konas la intervalon inter ĉiuj du notoj, oni povas sufiĉe bone kanti la tutan skalon. La venontan fojon ni praktikos ĉion ĉi per tre fama franca kanto, *Frère Jacques* (frato Jakobo).

Kajeroj

el la Sudo



BULTENO DE HISPANA ASOCIO DE LABORISTOJ ESPERANTISTAJ (HALE)

REDAKCIO: Poŝtkesto 4461,
E30080 MURCIA,
HISPANIO

Retskribu al
hale@distrito.com

<http://www.distrito.com/esperanto/kajeroj.htm>

<http://www.dragonfire.net/~Esperanto/kajeroj.htm>



Depósito legal: Z-2398-88

Presejo: Alegría.